# Gazeto Andaluzia

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

33-a Jarkolekto * Decembro 2019 * N-ro 115

ISSN 1576-0618



**BELALCÁZAR**
**Ponto inter Andaluzio kaj Ekstremaduro**

Gazeto Andaluzia
Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.
Órgano oficial de la **Asociación Andaluza de Esperanto.**

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto
REDACCIÓN: C/ Anfora 6 5-D 29013 Málaga (Hispanio)
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.
IMPRIME: Litopress SL Córdoba

DIRECTOR: Ángel ARQUILLOS LÓPEZ
REDACTOR: José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ
COLABORADORES: Alejandro BURGOS ESCALANTE
Vicente HERRERA COBO
Juan GARCÍA DEL RÍO

ENHAVO

Solidareco .....3
Esperanto en Andaluzio .....5
Kiam la hispana kaj la angla lingvoj renkontiĝis:
La lingvo de Ĝibraltaro .....8
Lingva Angulo: *el uso de "se" impersonal y reflexivo* .....14
Poezio.....20
Kvazaŭ himno.....21
Turismi en *"Belalcázar"* .....23
Paĝoj pri Nia Historio: *Antonio Gil Muñiz* .....28
Flamenko: *"La Cigana Princo"* .....31
Andaluzia Kuirarto .....33
Misteroj kaj legendoj de Andaluzio .....35
Krucvortenigmo .....38
Rebuso .....40
Humuro .....41

Noto: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.
La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn

# SOLIDARECO

La mondo kiun ni travivas dum la lastaj semajnoj eĉ ne estis pripensita en la plej stranga scienc-fikcia rakonto: dekmiloj da mortintoj pro nova malsano, centmiloj da infektitaj, hospitaloj plene okupitaj, haltigitaj laborejoj kaj milionoj da homoj kiuj pacience atendas la finon de la nuntempa situacio. Tamen, ĉi tiuj travivaĵoj aperigis la plej bonajn vizaĝojn de niaj apuduloj, kondutoj kiuj antaŭe ŝajnis ne-ekzistantaj ĉirkaŭ ni.



Balkonoj en Hispanio je la 20:00-a horo

Antaŭ kelkaj monatoj la plej ofta eldiraĵo inter najbaruloj estis simpla *"bonan tagon"*, hodiaŭ, male, aperas algluita sur la muroj ĉiaj mem-oferoj de tiuj kiuj deziras helpi al tiuj kiuj ne povas butikumi aŭ iri en apotekon. Mem-proponas ankaŭ tiuj instruistoj kiuj loĝas proksime al niaj hejmoj por daŭrigi la instruadon de la plej junaj. Aperis do, ree, tiu vorto kiu jam ŝajnis esti forgesita: *Solidareco.*

La aktuala solidareco estas tute malsimila al tiu de antaŭ kelkaj monatoj. Antaŭe ĝi efektiviĝis nur okaze de mon-donacoj al foraj landoj, aŭ kiam ni helpis ne-konatulojn kiuj ne loĝis apud ni, ili temis pri "aliaj" kaj tiu solidareco efektiviĝis el supra pozicio. Tiel, ni estis solidaraj kun tiuj foraj homoj ĉar ni vidis ilin tre malproksime, ili ne ĝenis dum nia ĉiutaga vivo, ili aperis nur sur-televide. Ni estis pretaj helpi ilin, tamen ni ne deziris enmiksiĝi en tiu koto, tiu iris nur "frenezuloj" kiuj estis kapablaj forlasi la komforton de nia socio. Tiu solidareco ankaŭ trankviligis la konsciencon de la registaroj, kiuj pensis, ke ili jam estis solidaraj kiam oni atingis, per mon-donacoj, nivelon de la malneta enlanda produkto.

Tamen, verŝajne io ŝanĝiĝis. Hodiaŭ la solidareco estas pli forta sento, ŝajnas, ke ne ekzistas aliuloj ĉar ni ĉiuj estas NI kaj ni bezonas ĉies helpon. Dum la nuntempaj vesperoj, ĝuste je la dudeka horo, sur balkonoj ni ĉiuj demandas al ĉiuj ĉu estas bezonate kelka helpo. Ve! Antaŭ kelkaj monatoj ni nur estis kapablaj ekdiri *bonan matenon* kaj poste diskuti okaze de najbarulaj renkontiĝoj pro la plej stultaj aferoj, tamen nuntempe, ni oferas nian helpon tut-sincere.

Vere, ni ne ŝanĝis, ni eĉ ne estas ŝanĝantaj, nur temas pri la apero de tio kio restis antaŭe kaŝita sur nia haŭto: solidareco, respekto kaj amo kaj tio okazas ĝuste nun, kiam la izoligo forgesigis la mon-avidon al ni.

En nia andaluzia dir-maniero ĉi tiun solidarecon ni esprimas per malnova sentenco: *"to er mundo é güeno"* (ĉiuj estas bonaj). La ĉina filozofo Konfuceo antaŭ multaj jarcentoj diris tion same: *"ne ĉiuj homoj povas esti kleraj, tamen ĉiuj povas esti bonaj"*. Espereble, kiam ni denove rajtos piedpremi niajn trotuarojn, tiu solidareco daŭriĝos.




Afiŝo de la filmo *"To er mundo e...gueno"* de Manuel Summers (1982).




# ESPERANTO EN ANDALUZIO




## ➢ Kurso de Esperanto en Sevilo dum la kvaranteno.

Dum ĉi tiu kvaranteno (san-izoligo), okazas en Sevilo Esperanto-kurso, ĉefe ekde la vidpunkto de la komunikado. La gvidanto de la kurso estas la universitata profesoro Vicente Manzano. Unuamomente la gelernantoj estis komencantoj el Sevilo, tamen poste aldoniĝis interesitoj de aliaj urboj. Entute nun en la kurso partoprenas 20 homoj el 7 urboj.



Kompreneble, la kurso ne povas okazis ĉe tipa klas-ĉambro, ni memoru, ke oni ne rajtas promenadi sur-strate sen-kiale, tiel la renkontiĝoj okazas semajne po unu fojo, ĵaŭde. Oni aranĝis du grupoj, unu je la 12-a kaj la alia je la 17-a horo. La gelernantoj laboras grupe kaj la lasta laboreto ĉiutage temas la kreo de nova vorto per kunmetaĵo, duope aŭ triope. Gelernantoj renkontiĝas per-komputile kaj ili havas la celon interparoli en Esperanto. Pro tio, materialoj ankaŭ enhavas vortareton pri komunaj esprimoj en laboraj grupoj.

## ➢ Renkontiĝo de Sevila Esperanto-Asocio kaj prelego pri Esperantismo.

La pasintan 15-an de februaro okazis en la "Siren-domo", municipa palaco en la *Alameda de Hércules*, kie okazas kurso de Esperanto, renkontiĝo de la Sevila Esperanto-Asocio. Ĉeestis deko da membroj de la asocio kiuj dum kelkaj horoj diskutis pri la okazantaj kursoj en la urbo, pri la partopreno de la asocio en festivalo de lingvoj okazonta baldaŭ en la Universitato kaj laste pri la renovigo de la TTT-paĝo de la asocio.

Post la renkontiĝo, la kordova samideano J.M. Rodríguez prelegis pri la temo *"Esperantismo, un movimiento para una lengua / Esperantismo, movado por lingvo"*.



## ➢ Andaluzia politika partio uzas Esperanton.

*Solidaridad Internacional Andalucía* (Internacia Solidareco Andaluzio) publikigis en sia retpaĝo legindan malfermatan leteron aŭ manifeston pri la nuntempo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Bona afero estas ankaŭ, ke ili publikigis hispane kaj angle. Poste oni aldonis la Esperantan version, kaj laŭ aserto de ĉi tiu politika partio, *" la deziro estas, ke la*

*Esperanta versio estu en la unua pozicio".* Ili ankaŭ aldonis, *"ni atendas la germanan, araban kaj francan, kaj nia decido estas ke Esperanto estu la unua kaj la angla la lasta."*

Jen la vizitinda ret-paĝo:
http://www.solidaridadandalucia.org/coronavirusycolapso/

solidaridad internacional
ANDALUCÍA

aeu
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto

## GRAVA INFORMO POR LEGANTOJ

Ĉi tiu 115-a numero de *GAZETO ANDALUZIA* aperas unue interrete. Hispanio kaj multaj aliaj landoj en la mondo travivas malfacilajn monatojn pro la koronviruso KOVIM-19. La hispana registaro proklamis staton de alarmo en la tuta lando kaj pro tio ni, hispanoj, rajtas resti for niaj hejmoj nur pro tre konkretaj pravigeblaj motivoj. Alie, la presejo kiu ellaboras nian revuon restas malfermita dum ĉi tiuj tagoj, pro tio ni ne povas presi ĉi tiun numeron de nia revuo kaj tiel, ni aperigas ĝin unualoke sur la reto. Espereble, kiam la stato de alarmo malaperos ni sukcesos eldoni ĝin kaj tiel ni dissendos la revuon al ĉiuj membroj de nia asocio kaj simpatiantoj de la internacia lingvo.

# KIAM LA HISPANA KAJ LA ANGLA LINGVOJ RENKONTIĜIS: LA *LINGVO* DE ĜIBRALTARO

Kiam du komunumoj parolantaj malsimilajn lingvojn troviĝas unu apud la alia, ofte aperas mikso de frazoj kaj vortoj de ambaŭ lingvoj. Tamen atentu, tiu simpla kunigo de vortoj aŭ frazoj ne estas piĝino, pro la fakto, ke piĝino havas simplan gramatikon kaj eĉ propran vort-provizon. Ni parolas pri tiuj vortoj kaj frazoj uzataj en landlimoj, ekzemple la *spanglish*, miksaĵo de la angla kaj la hispana lingvoj uzata en la sudo de Usono; aŭ la hispan/portugala lingvo parolata en la landlimo inter Brazilo kaj Paragvajo, tie oni diras samtempe *"yo sou brasileño"* kaj *"eu soy brasileiro"* (mi estas brazilano), tio estas sen-regula uzado de vortoj en la portugala kaj la hispana lingvoj ene de la sama frazo. Fakuloj asertas, ke en tiuj ekzemploj ni troviĝas ĉe la unua etaĝo tamen ĝi ne estas piĝino.



Ĝibraltaro, rokego sude de Hispanio

En Andaluzio tio okazas en la brita kolonio de Ĝibraltaro. En tiu kolonio loĝas 35.000 homoj kaj preskaŭ 80% el ili parolas, krom la anglan, ankaŭ la hispanan. Vere, tio estas neprajo el la geografia vidpunkto, ĉar Ĝibraltaro nur mezuras 5 $KM^2$ kaj Britio troviĝas je pli

ol 1.500 KM kaj Hispanio tuj apude. Do, ĝibraltaranoj ofte vojaĝas al ĉirkaŭanta andaluzia teritorio kaj eĉ multaj el ili, malgraŭ sia brita civitaneco, loĝas reale en Andaluzio. Tiel, ĝibraltaranoj parolas la hispanan lingvon, tamen kun vortoj, frazoj kaj gramatikaĵoj prenitaj rekte el la angla, temas pri la "lingvo janita" aŭ *yanito language.* Estas necese diri nun, ke la vorto *yanito* au *llanito* (prononcu: "janito") estas kares-forma nomo de la ĝibraltaranoj.

Do, la *janita lingvo* reale ne estas lingvo, eĉ ne piĝino, nur temas pri la enirigo en la hispanan lingvon parolata de ĝibraltaranoj de vortoj aŭ gramatikaĵoj de la angla lingvo, plej ofte temas pri la rekta traduko de anglaj vortoj kiam oni parolas la hispanan lingvon. Jen kelkaj ekzemploj:

- *Te llamo pa' tras* = mi retelefonos vin. Ĝi devenas en la angla *"I'll call you back"*, do, de la rekta traduko de la angla *back* en la hispana *de vuelta, para atrás.*
- *Estoy de libertad* = mi ferias. El la laŭ-litera angla *I'm free*. *Free* en la hispana lingvo signifas "libero".
- *Pudimpé* = pudin-telero. Laŭ la hispana prononco de la angla *puding pan.*
- *Tipá* = te-kruĉo. Same, ĝi devenas ankaŭ el la hispana prononco, ĉi-foje de la angla *tea pot.*
- *Don't give me the tin* = ne ĉagrenu min. Ĝi devenas el la rekta traduko en la anglan de la hispanlingva esprimo *"no me des la lata"* = ne ĉagrenu min.
- *Denticá* = identigilo, indetig-karto. Temas pri la hispana prononco de la angla *identitiy card.*
- *Pómpalo* = levu la tonon. Ĝi devenas el la angla *pump up* + la hispanlingva *lo* = ĝin.
- *Pipería* = tubaro. Temas pri mikso inter la angla *pipe* kaj la hispana *tubería*, ambaŭ signifas same: tubaro.



La kontaktoj inter la kolonio kaj la ĉirkaŭanta teritorio estas konstantaj.

Kaj inverse? Ĉu ekzistas vortoj el la angla lingvo uzataj en la andaluziaj vilaĝoj proksime al Ĝibraltaro? Sendube jes, jen kelkaj el ili:

- *Jánbo* = manpilko, el la angla *"hand-ball"*, kies prononco en la hispana similas al *"jánbo"*. Ofte, kiam infanoj en La Línea aŭ en Alheciro (la plej apudaj urboj al Ĝibraltaro) ludas futbalon kaj unu el ili tuŝas pilkon per sia mano, la ceteraj infanoj ludantaj krias *"jánbo"*, tiel ili diras, ke temas pri futbalo, ne pri manpilko. (Prononcu: *hánbo).*


- *Chachipen* = altkvalita. Kvankam ekzistas aliaj opinioj pri la origino de ĉi tiu vorto, oni diras, ke ĝi troviĝas en Ĝibraltaro post la hispana civila milito. Tiam, kelkaj homoj vendis kaŝite altvalorajn varojn de la kolonio, mankantaj tiutempe en Hispanio. Unu el tiuj varoj estis la pano, la tiel nomata *"Churchill pan"*, pro la nomo de la tiama brita ĉef-ministro. Fine tiu pano kaj aliaj altkvalitaj varoj de la kolonio ricevis la nomon *"chachipen"* kies prononco estas simila al tiu de la angla *"Churchill pan"*.

- *Chuar* = elekti. Kiam la infanoj ludas sur-strate, ekzemple futbalon aŭ aliajn infanajn ludojn, ili devas decidi unue sur kiu zono ludas ĉiu teamo, tio estas, ili lotas pri la loko. En la angla lingvo tio mem estas esprimata kiel *"choose"*, la hispanlingva prononco de ĉi tiu vorto estas *"chu = ĉu"*. Se al tiu prononco ni aldonas la verban finaĵon *"ar"* el la hispana, aperas la vorton *"chuar"*.

- *Panquequi* = plumkuko. Temas pri la hispanlingva prononco de la angla vorto *"plum cake"*.


- *Conbí* = enladigita bovaĵo. Unu el la plej konataj varoj de la kolonio estas bovaĵo enladigita, kies nomo en la angla lingvo estas "*corned beef*", kies prononco en la hispana lingvo estas simila al *"conbí"*.

Rilate al la prononcado de ĉi tiu *"preskaŭ-piĝino"*, ĝi estas tute simila al la andaluzia parol-maniero, ekzemple, lasta konsonanto de la vortoj, eĉ rilate la pluralon, malaperas kaj la lasta vokalo tute malfermiĝas, tiel ĝibraltaranoj diras *"televishó"*= televid-aparato, el la hispana "*televisor*", laŭ la andaluzia parolmaniero.



De tempo al tempo estas uzata en la ĝibraltara televido la *"preskaŭ-piĝino"* de la kolonio.

Kompreneble, ekzistas nenia regulo, nek oficiala instanco por disvolvigi ĉi tiun *lingvon*, eĉ ne ekzistas radiaj aŭ televid-programoj kiuj uzas ĝin, tamen de tempo al tempo okazas debatoj en la ĝibraltara televid-kompanio kaj kelkaj partoprenantoj parolas per tiu mikso de angla kaj hispana lingvoj per andaluzia dir-maniero.



# Andaluzio
# Lando plena de Historio

# ALIĜU AL
## *Andaluzia Esperanto-Unuiĝo*

Se Vi deziras kunlabori en la disvastigado de la internacia lingvo en Andaluzio, jen Via asocio.

Por aliĝi al AEU kontaktu kun: cordoba@esperanto.ac
Jara Kotizo: 20 € pagebla ĉe la jena konto:

- BANKIA

ES80 0487 3225 1420 0000 6979

Okaze de la pago de la jara kotizo bv. informi pri la jenaj sciigoj:

- Nomo de la aliĝanto.
- Afero: Kotizo 2020

# HAZTE SOCIO DE LA
## *Asociación Andaluza de Esperanto*

Si deseas colaborar en la difusión de la lengua internacional en Andalucía, aquí tienes tu asociación.

Para hacerse socio contacta con: cordoba@esperanto.ac
Cuota anual: 20 € que se pueden abonar en la cuenta siguiente:

- BANKIA


ES80 0487 3225 1420 0000 6979

Cuando pagues por favor informa de los siguientes datos:

- Nombre del nuevo socio.
- Concepto: Cuota 2020

# Lingva Angulo

## *El uso de "se" impersonal y reflexivo*



Pro la fakto, ke ĉi tiu paĝo estas pripensita por tiuj hispanlingvanoj, kiuj alproksimiĝas aŭ konas iomete la internacian lingvon Esperanton, kaj kun la celo prezenti ĉi tiujn klarigojn al ili kiel eble plej sukcese, ekde nun la lingvo ĉefe uzata en ĉi tiu paĝo estas la hispana.

*Debido a que esta página está pensada para los hablantes de español que se acercan o conocen un poco de la lengua internacional Esperanto, y con el objetivo de aclarar estas cuestiones de la manera más eficaz posible, desde ahora se usará principalmente el español en esta página.*

Vamos a hablar hoy de cómo traducir "SE" al esperanto, tanto indicando algo impersonal como cuando se utiliza como reflexivo. En primer lugar podemos encontrarnos en español el "se" en las oraciones impersonales, son aquellas en las que no se especifica ningún sujeto, así no es lo mismo decir: *"tú dices que mañana vendrás"* que *"**se** dice que mañana vendrás"*. En el primer ejemplo "tú" es el sujeto de la oración, pero en la segunda el sujeto es alguien indeterminado.... "***se** dice, **se** comenta, **se** opina"*. En esperanto ese **SE**, se traduce por **ONI**. Veamos algunos ejemplos:

- ***Oni** diras, ke vi venos morgaŭ.*
  **Se** dice que tú vendras mañana.
- ***Oni** asertas, ke baldaŭ estos trovata vakcino kontraŭ la viruso.*
  **Se** asegura, que pronto será encontrada una vacuna contra el virus.

- *La domo, en kiu **oni** laboras, estas laborejo.*
  La casa, en la que **se** trabaja, es una oficina.

Naturalmente, en todos estos ejemplos habría sido posible sustituir ese "**se=oni**" impersonal por cualquier persona, así "tú dices, él asegura, yo trabajo", pero se elige ese uso impersonal, bien porque no se conoce quién es realmente el sujeto o porque, aun conociéndolo, no se quiere precisar quién sea. Por ejemplo:

- *Okaze de mi vizito al tiu fora lando, oni helpis min.*
  Con ocasión de mi viaje a aquel lejano país, se me ayudó.

Es decir, yo recibí ayuda y seguramente incluso conozco quién lo hizo, pero no veo necesario indicarlo en la frase, así que digo simplemente que "**se** me ayudó = **oni** helpis min".

Del impersonal *oni* pueden aparecer otras formas, como el sustantivo ***onio*** (traducible como colectividad) y el adjetivo ***onia*** (perteneciente a un colectivo impersonal), pero son términos de muy difícil traducción y que además casi nunca aparecen en un esperanto normal, quizá sea usado en literatura, pero en el hablar diaria en esperanto resultaría muy extraño escuchar: "*tiu estas onia opinio*" = esa es una opinión que pertenece a un colectivo indeterminado (la traducción resulta muy complicada). También resulta extraño leer, aunque es totalmente correcto, ***onin***, por ejemplo en la frase: "*la viruso malsanigas onin*" = el virus hace enfermar a una generalidad de personas. Aunque sea correcta esta forma de oni+acusativo es inusual.

Y para terminar con el tema del "**se=oni**" impersonal hay que advertir que no se puede utilizar una respuesta impersonal cuando alguien nos pregunta a nosotros mismos. En español puede existir la siguiente conversación:

- ¿Cómo estás? Ah, bueno, se va tirando.

Es decir, se ha preguntado algo concreto a una persona y ésta contesta con algo que afecta a una generalidad impersonal. En esperanto si se pregunta *"kiel vi fartas?"* La respuesta será *"mi fartas bone/malbone"*, pero nunca se podrá responder *"oni fartas bone"* si la pregunta se ha dirigido a una persona en concreto.

Otro uso del "se" en español es el reflexivo, que no tiene nada que ver con el "se" impersonal que acabamos de ver, sin embargo en ambos tipos de construcciones aparece "se", pero con un significado totalmente diferente en español. En esperanto el "se" reflexivo se puede decir de dos maneras. Veamos algunos ejemplos:

- *Mia patro razas sin ĉiumatene.*
  Mi padre se afeita cada mañana.

En esperanto una de las maneras de traducir el "se" reflexivo del español es con *"si"*. Pero es muy importante señalar que ese *"si"* en esperanto siempre, siempre se refiere al sujeto, independientemente de que sea singular o plural.

- *Miaj gepatroj kisas sin ofte.*
  Mis padres se besan habitualmente.

Si dijéramos *"miaj gepatroj kisas lin ofte"* entraría en juego una tercera persona (li) a quien mis padres besan a menudo. Pero si decimos *"miaj gepatroj kisas sin"*, nos estamos refiriendo a que "mis padres se besan" . Si ya existe un objeto directo en la oración *"si"* no iría en acusativo (*sin*), sino con la preposición correspondiente *(al si, por si, pro si...).* Ejemplo:

- *Mia patro hieraŭ razis la lipharon al si.*
  Mi padre ayer se afeitó el bigote.

Otra forma de expresar el "se" reflexivo en esperanto es usar el sufijo *"iĝ"* en el verbo. En este caso nos encontraremos ante un

cambio de estado del sujeto, con la idea de que se convierte, se cambia al estado de, se transforma... Veamos algunos ejemplos:

- *Malgraŭ viaj insultoj, li ne ofendiĝos.*
  A pesar de tus insultos, él no se ofenderá.
- *Hieraŭ tagiĝis pli frue.*
  Ayer se hizo de días más temprano.
- *Nigriĝi* = volverse negro.
- *Edziĝi* = volverse esposo (casarse desde el punto de vista del marido).
- *Edziniĝi* = volverse esposa (casarse desde el punto de vista de la mujer).

¿Qué diferencia habría entre usar el reflexivo *"si"* o el verbo terminado en *"iĝ"*?

El sufijo *iĝ* expresa un cambio de estado, pero sin precisar al causante del cambio, mientras que cuando usamos *si*, estamos subrayando la acción voluntaria del sujeto sobre sí mismo. Fernando de DIEGO en su "Nuevo Método de Esperanto" utiliza los siguientes ejemplos:

- *La aŭto koliziis kontraŭ arbon kaj la ŝoforo mortiĝis.*
  El auto chocó con un árbol y el conductor se murió.
- *Pro sia neresanigebla malsano li decidis mortigi sin.*
  A causa de su enfermedad incurable él decidió matarse.

En la primera frase se indicá que el conductor "se murió", mientras que en la segunda es determinante saber quién fue el causante de esa muerte, *"li mortigis sin"*, él se mató, se suicidó, de no haber sido él el causante de la muerte, no habría existido suicidio.

Por esta misma idea, debemos tener cuidado de decir *"lavi sin"* (lavarse) o *"razi sin"* (afeitarse), pero no *"laviĝi"* o *"raziĝi"*. Aunque esta cuestión admite matizaciones, en tanto que *"laviĝi"* puede admitirse, pero con la idea de algo pasivo, es decir que algo es lavado, pero no para expresar la idea de que algo se lava a sí mismo. Ejemplo:

*"la plaĝo laviĝas pro la konstantaj mar-ondoj"* = las playa se lava por las constantes olas del mar.

Esperamos haber dejado un poco más resuelto el tema de cómo traducir "se" en esperanto. Te proponemos algunas frases para que las traduzcas, por supuesto al final viene la solución, pero el lector debe intentar resolverlas por sí mismo.

1) Se dice que el hombre no irá a Marte hasta el año 2050.

_____

2) El médico se lavó las manos antes de entrar al hospital.

_____

3) Se hizo de día y aún no había llegado a casa.

_____

4) Mi madre se casó tres años antes de mi nacimiento.

_____

5) Si mi hermano no se afeita, después de dos semanas tendrá una gran barba.

_____

6) Invirtió todo su dinero en un mal negocio y se arruinó.

_____

1) Oni diras, ke la homo ne iros en Marson ĝis la jaro 2050.
2) La kuracisto lavis al si la manojn antaŭ ol eniri en la hospitalon.
3) Tagiĝis kaj li ankoraŭ ne venis hejmen.
4) Mia patrino edziniĝis tri jaroj antaŭ mia naskiĝo.
5) Se mia frato ne razas sin, post du semajnoj li havos grandan barbon.
6) Li investis sian tutan monon en malbona negoco kaj li ruiniĝis.

FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO
HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

KantEA




# ATENTU !

Kantabra Esperanto-Asocio kaj Hispana Esperanto-Federacio informas, ke pro la nuntempa koronvirusa epidemio, kiu provokis la aprobon de stato de alarmo fare de la hispana registaro, la 79-a Hispana Kongreso de Esperanto, unuamomente okazigota fine de la monato aprilo, prokrastiĝas ĝis la monato oktobro, ĝuste de la 9-a ĝis la 13-a de oktobro. Ĝis nun aliĝis 128 homoj el 12 landoj.

Pliaj informoj kaj aliĝilo ĉe: https://www.esperanto.es/kantea

# P O E Z I O

## HO, DETRUEMA HOMAR'



Tiun mondon regas la homar'
pere de frenezaj reguloj
ĉu vere inteligentuloj?
ne, Panjo, temas pri stultular'

ĉieajn maljustecojn vidu!
ĉian problemon milit'solvos
malriĉuloj plejeble mortos
konkurenc' ĉion, ĉie, makulu!

kio pri interkomunikad'?
kion faros minoritatoj?
lernu la anglan! Ĉiuj ŝtatoj
jen kio utilas al merkat'

detruas la homar' la mondon
ĉiuj specioj: iru for jam!
naturon ni ne traktu per am'
oni forgesu la estonton

plendu, plendu multe, loĝantoj
kvankam tion ne solvos vento
estas ankoraŭ frua tempo
estu zorgemaj, la regantoj!

*Juan García del Río*

# KVAZAŬ HIMNO

Jen la plej aŭskultata kaj ludata kantaĵo en Hispanio dum la lastaj semajnoj, temas pri *Resistiré* (Rezistos mi) de la hispana muzik-ensemblo "Duo Dinámico". La kantaĵo aperis ene de disko en la jaro 1988 kaj nur du jaroj poste, ĝi estis uzata en la filmo *"Átame"* de Pedro Almodóvar.

En la jaro 2001, ĝi estis ne-oficiala himno kantata de argentinoj dum la tiutempa ekonomia krizo. Kaj ĝuste nun, en la jaro 2020, ĝi estas la himno kiu elstaras la lukton kontraŭ la koron-virusa malsano. Ĉiu-vespere, ĉe la balkonoj de ĉiuj hispanaj domoj, ni ĉiuj aŭskultas kaj foje eĉ kantas ĝin.

La aŭtoroj de la kantaĵo, rilate la muzikon Manuel de la Calva kaj la tekston Carlos Toro, disponigis ĝin tut-libere al la hispana socio. Tial, ĵus aperis versio kantita de dudeko da hispanaj kantistoj.

Jen la momento, disponi ankaŭ pri la traduko de *"Rezistos mi"* en la internacian lingvon:

*Kiam perdos mi ĉiujn partiojn,*
*kiam dormos mi ĉiam en solec',*
*kiam al mi fermiĝos la eliroj*
*aŭ mi restos ĉiam en noktec'.*

*Kiam timos mi, iel, la silenton*
*Aŭ stari malfacilos pli kaj pli,*
*Kiam memorаĵoj estos venĝoj*
*Inter mur' kaj glavo estos mi.*

*Rezistos mi !*
*Mi staros kontraŭ ĉio.*
*Eltenos mi la batojn kaj por ĉiam sen rezign',*
*eĉ se la ventoj de la vivo forte blovus,*
*mi estas junko, malrigidas, sed staras ĝis la fin'.*

*Rezistos mi !*
*La vivo plue daŭros*
*kaj mia haŭt' estos malmola kiel la ŝton',*
*eĉ se la sonĝoj tuj rompiĝus kiel glaso,*
*Rezistos mi...Rezistos mi !*

*Kiam perdus mondo sian magion,*
*kiam estos mi, mia malamik',*
*kiam min ponardos nostalgio*
*aŭ mian voĉon ne rekonos mi.*

*Kiam frenezeco min minacos*
*aŭ bonŝanco jam forlasis min,*
*se l'diablo petos sian parton*
*aŭ se mi sopiras iam vin.*

*Rezistos mi !*
*Mi staros kontraŭ ĉio,*
*eltenos mi la batojn kaj por ĉiam sen rezign',*
*eĉ se la ventoj de la vivo forte blovus,*
*mi estas junko, malrigidas, sed staras ĝis la fin'.*

*Rezistos mi !*
*La vivo plue daŭros*
*kaj mia haŭt' estos malmola kiel la ŝton',*
*eĉ se la sonĝoj tuj rompiĝus kiel glaso.*
*Rezistos mi... Rezistos mi !*



# *Turismi en* ... BELALCÁZAR (Kordovo)

Norde de la provinco Kordovo troviĝas Belalcázar (prononcu: *Belalkázar*), vilaĝo kiu ĝis la jaro 1833 apartenis al la ekstremadura regiono, vere ĝi estas tuj apud la badaĥoza provinco. Tamen, teritoria reordigo de la ministro Javier de Burgos lokigis ĝin en Kordovo, do en Andaluzio.

Restaĵoj trovitaj apud la vilaĝo kaj en la apuda *Cabeza del Buey*, en Badaĥozo, pruvas, ke tie sidejis homoj dum la malfrua paleolitiko (9.000 jaroj a.K.). Oni stariĝis ankaŭ kelkajn dolmenojn apartenantaj al la neolitika epoko, proksimume 3.000 jaroj a.K., sur tiuj dolmenoj estis gravuritaj cirklaj petroglifoj. Iberoj sidejis ankaŭ sur Belalcázar, tion pruvas murego trovita apud la preĝejeto de la Virgulino de *Gracia de Alcantarilla* kaj ankaŭ kelkaj ceramikaĵoj, supozeble temis pri grava ibera setlejo kiu devis defendi sin de eksteraj atakoj, jen la celo de la murego.



Blazono de BELALCÁZAR

Ankaŭ ekzistas gravaj restaĵoj de la romia konkero de la vilaĝo. Romianoj profitis la minajn rimedojn de la zono, post la pasado de la romianoj restas bela ponto, kiun ankoraŭ estas eble vidi. La romia *Plinio la oldulo* parolas pri loko nomita *Beturia* kie loĝis popolo nomita *Turdulos* en la kordova provinco, aŭ *Conventus Cordubensis.* Romianoj eĉ konstruis akvo-rezervujon cele la terkulturan produktadon. Ili ankaŭ konstruis banejon, nuntempe ene de privata bieno, sed kun videblaj restaĵoj. Ankaŭ oni trovis multajn monerojn kaj sur ili aperis la nomo de tiu romia vilaĝo *Gaet,* jen la unua nomo de Belalcázar.

. Kiam la araboj alvenis en la Iberan Duoninsulon en la 8-a jarcento p.K., ili profitis la restaĵojn de romia fortreso kaj nomis la lokon per *Gafiq,* temas pri la arabigo de la romia nomo *Gaet.* Tie naskiĝis en la 12-a jarcento Muhammad Ibn Qassoum Ibn Aslam Al-Gafequi, unu el la plej gravaj okulkuracistoj en Al-Andaluso.



Statuo starigita en Kordovo honore al Mohamed Al-Gafequi, prestiĝa al-andalusa okul-kuracisto.

La kastilia reĝo konkeris la vilaĝon en la jaro 1241, kiu renomiĝis kun la origina romia nomo *Gahete.* Dum la 14-a jarcento oni konstruis imponan kastelon, kiu nun estas la simbolo de la vilaĝo kaj eĉ la radiko de la nuntempa nomo, do, *Belalcázar* estas miksaĵo de la vortoj *Bello* kaj *Alcázar*, tiel la nomo mem de la vilaĝo esats omaĝo al la impona kastelo. La ĉefturo de la fortreso, mezuranta 47 metrojn alte, estas la plej alta el la hispanaj kasteloj. Dum la 16-a jarcento oni konstruis renesancan palacon apude al la mezepoka kastelo.

Dum tiu tempo la enloĝantoj de Belalcázar ne posedis sian proprajn bienojn, do ili devis labori profite al riĉaj nobeloj, pro tio multaj enloĝantoj devis migri en Amerikon por ĝui pli bonan vivon. Unu el ili estis *Sebastián de Belalcázar*, fondinto de la urbo Kito, ĉefurbo de Ekvadoro en la jaro 1534. Li ankaŭ fondis pliajn urbojn, tiel Kalio kaj Popajano en Kolombio, krome li estis la unua organizanto de ekspedicio por trovi la mitan urbon Eldoradon.


Komence de la 19-a jarcento la Napoleona armeo okupis la vilaĝon kaj ĉefe la kastelon por kontroli la vojon inter Ekstremaduro kaj Andaluzio. Post la franca invado multaj enloĝantoj sub la milita gvidado de la pastro mem de Belalcázar, *Clemente Arribas*, luktis gerile kontraŭ la invadantoj, kiam oni forpelis la napoleonan armeon la belega kastelo restis tre damaĝita.

Dum la dua duono de tiu jarcento oni konstruis fervojan linion kun stacidomo en la vilaĝo, tiu linio sekvis en la jaro 1873 la reĝo Amadeo la 1-a kiam survoje en Lisbonon li ekziliiĝis. En la 20-a jarcento Belalcázar restis fidela al la respublika reĝimo, pro tio oni detruis kelkajn valorajn religiajn artaĵojn. Fine de la milito la marokaj soldatoj de la naciista armeo okupis la vilaĝon kaj tio provokis politikan persekutadon dum kiu kelkaj maldekstremuloj mortis, aliaj daŭre luktis en la siero kiel gerilistoj.

Nuntempe, Belalcázar estas vilaĝo kun 3.500 enloĝantoj, kies ĉefa ekonomia rimedo estas la brut-bredado, ĉefe bovinoj. Ankaŭ estas grava la ĉasado kaj lastatempe la kampara turismo.

## Monumentoj

La kastelo de la familio *Sotomayor y Zúñiga*, ankaŭ konata kiel kastelo de *Gahete* estas unu el la plej gravaj modeloj de la milita arkitekturo de la 15-a jarcento en Hispanio. La kastelo havas rektangulan bazon kun alta ĉef-turo, la plej alta en la hispanaj kasteloj. La bela aspekto de la ĉef-turo estas la origino de la nomo de la vilaĝo mem.




Kastelo de la familio *Sotomayor y Zúñiga*

La romia ponto estis parto de antikva romia vojo kaj mez-epoke ĝi ligis Kastilion kun la nordo de la kordova provinco, do ĝi estis uzata de la paŝtistoj kiuj gvidis ŝafarojn. Temas pri forta ponto kiu eĉ nuntempe eltenas la altiĝon de la rivereto *Guadamatilla.*



Romia ponto



La monaĥinejon de Sankta Klara de la Kolono oni konstruis en la 15-a jarcento. La krom-nomo "de la kolono" ŝuldiĝas al la fakto, ke en la jaro 1490 monaĥinoj de la monaĥinejo de *Calabazanos* en la provinco *Burgos,* venis en Belalcázar kaj ili alportis kristanan relikvon, konkrete peco de la kolono al kiu Kristo esti ligita dum la vipobatado. La preĝejo estis konstruata laŭ gotika stilo.

**Festoj**

Fine de la monato januaro okazas ĉas-festo. Dum semajnfino okazas levrel-kuradoj, falkado, kampar-promenadoj, ktp. Komence de februaro oni ekbruligas fajron en ĉiuj placoj kaj stratoj kvazaŭ altar-lumiloj. Oni kantas, dancadas kaj, kompreneble, oni manĝas kaj trinkas ĝis la ekmateniĝo.

Belalcázar estas vilaĝo kie la bruto-bredado estis (kaj ankoraŭ estas) grava ekonomia rimedo. Multnombraj ŝafaroj venis el Kastilio

por profiti la paŝtejojn de ĉi tiuj varmaj areoj. Ĉi tio estas memorata dum la monato aprilo ene de foiro speciala dediĉata al ŝafaroj.

Fine de aprilo okazas pilgrim-festo en la preĝejeto de la Virgulino de *Gracia de Alcantarilla*, la trapasado de la rivero *Zújar* estas belega spektaklo.



Trapaso de la rivero *Zujar* fare de la pilgrimantoj kaj la Virgulino

De la 15-a ĝis la 20-a de aŭgusto okazas foiro tipe andaluzia honore al Sankta Roĥo.

## Gastronomio

La gastronomio de Belalcázar baziĝas ĉefe sur porkaĵoj. Bongustaj estas la porkaj kotletoj en bulonjo kaj la porkaj manoj remburigitaj per oleo kaj pano. Tre famaj ankaŭ estas la ajl-gazpaĉo kaj la *ajohuevo*, vi trovos la recepton sur la paĝo 33-a.

Rilate dolĉaĵojn, ni devas elstari la *borrachuelos*, temas pri dolĉaĵo farita el tritik-faruno, oliv-oleo, blanka vino kaj aniz-brando.

*Venont-numere TURISMI EN ... HUESA (Jaeno)*

# Paĝoj pri Nia Historio

## *Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio*

# *Antonio Gil Muñiz*

*La malaga instruisto de instruistoj*



Antonio Gil Muñíz
1892 - 1965

Antonio Gil Muñiz naskiĝis en Ceŭto en la jaro 1892, lia patro estis ŝtat-oficisto en tiu nord-afrika urbo. Kiam li estis infano la familio devis translokiĝi en Malagon, tie lia patro okupis novan postenon. Jun-aĝe Antonio Gil decidis studi en la Por-instruista Lernejo, do en la jaro 1910 li jam estis instruisto. Lia patro instigis lin daŭrigi la studadon kaj pro tio li, en 1913, marŝis en Madridon, tie li specialiĝis en la instruado de sciencoj.

En la jaro 1916 li okupis postenon en la Por-instruista Lernejo de Kordovo, en ĉi tiu andaluzia urbo li loĝis dum pliaj 23 jaroj. En 1923 li ricevis stipendion por pliperfektigi siajn studojn en Eŭropo, do, li vojaĝis en Francion, Belgion kaj Svision por studi Psikologion kaj Pedagogion, ĉi tiu restado fore de Hispanio sendube riĉigis lin el la intelekta vid-punkto. En Kordovo, en tiuj jaroj, oni nomumis lin membron de la Kordova Reĝa Akademio de Beletro kaj Sciencoj, institucio kiu apogis la instruadon kaj uzon de la internacia lingvo, tutcerte pro la fakto, ke multaj el la membroj de tiu kultura organizo estis esperantistoj. La Kordova Akademio eĉ oni sendis specialan delegacion al internacia konfereco pri la uzo de Esperanto en la sciencoj, okazigita en Parizo en la jaro 1925.

Sendube, Antonio Gil Muñíz tie kontaktis kaj eklernis la internacian lingvon, do, en la jaro 1925 li partoprenis en la 3-a Iberia

Kongreso de Esperanto kiu okazis en Kordovo. Lia deziro perfektigi sin en la intelekta tereno ŝajnis senfina, ĉar en la jaro 1929 li finis jurajn studojn en la Universitato de Sevilo.

Kiam oni proklamas la respublikan reĝimon en Hispanio en la jaro 1931, Antonio Gil decidas ekagadi politike, li aliĝis al la Radikala Respublika Partio de Alejandro Lerroux. En tiu jaro mem, li jam estas direktoro de la Por-instruista Lernejo de Kordovo kaj unu el liaj unuaj decidoj, vere avangarda en tiuj jaroj, estis unuigi la kursojn por viroj kaj virinoj, ĝis tiam viroj kaj virino ne kuniĝis en samaj klas-ĉambroj. Dum tiuj jaroj li ankaŭ estis la direktoro de la revuo "*Revista de Escuelas Normales*" eldonita en Kordovo.



Por-instruista Lernejo de Malago, nova sidejo inaŭgurita en la jaro 1961, kies unua direktoro estis Antonio Gil Muñiz

En tiuj samaj jaroj li okupis la katedron pri itala lingvo en la Provinca Gimnazio de Kordovo, sendube liaj konoj de lingvoj dum la vojaĝoj tra Eŭropo, helpis lin. En la jaro 1935, la hispana registaro nomumis lin ĝeneralan direktoron pri infana instruado, tamen politikaj luktoj malebligis lin agadi laŭ liaj propraj kriterioj kaj pro tio li decidis reveni en Kordovon. La hispana civila milito (1936-1939) haltigis ĉion en Hispanio, ankaŭ la instruado, kiam la milito finiĝis la nova politika reĝimo de la generalo Franco decidis priesplori la pasintajn politikajn

agadojn de ĉiuj instruistojn en Hispanio kaj, se necese, forpeli ilin el la instruista profesio.

Pro la fakto, ke li apartenis al respublika partio li estas enkarcerigita en la prizono de *El Puerto de Santa María* (Kadizo). La speciala komitato kreita por pristudi la agadojn de ĉiuj instruistoj konsideris punindaj la faktoj, ke Antonio Gil apartenis al politika partio kaj krome, li sekvis teoriojn de liberpensuloj, kiel Francisco Giner de los Ríos. La edzino de Antonio Gil, Rosario Soriano, tiam decidis translokiĝi al tiu kadiza urbo por esti kiel eble plej apude. La geedzoj ne havis idaron.


Post la malliberigo li estis pune deportita en *Ansó,* vilaĝo en la nordo de Hispanio apud la Pirenea Montaro je pli ol 1.000 kmoj el Kordovo. Jam libera en la jaro 1942, li revenis en Malagon. Ĉar kondamnita, li ne rajtis instrui en publikaj lernejoj, do li decidis malfermi akademion en la strato *Álamos* de Malago, kun la nomo "*Doctor Angélico*", tie li instruis fizikon, kemion, matematikon, lingvon kaj pedagogion. En la jaro 1945 oni nuligis la kondamnon kaj nur unu jaro poste li estas nomumita profesoro pri Pedagogio en la Por-instruista Lernejo de Malago. En 1957 li jam estas direktoro de tiu lernejo. Dum tiuj jaroj li estas ofta kunlaboranto en la malaga ĵurnalaro kaj verkisto de gravaj pedagogiaj libroj, kiel la tri-voluma serio *Estudios Pedagógicos Modernos* (Modernaj Pedagogiaj Studoj) de la jaro 1955.

En la jaro 1962 li emeritiĝis, post la inaŭguro de la nova sidejo de la Por-instruista Lernejo en Malago. Li forpasis en Malago en la jaro 1965, lia privata biblioteko, preskaŭ kvar mil libroj, troviĝas nun en la Biblioteko de la Universitato de Malago.

Cele la diskonigon de la riĉa Esperanto-historio en Andaluzio ni kreis fejsbukan paĝon en interreto, tie aperos, en la hispana lingvo, la artikoloj jam aperintaj sur *Gazeto Andaluzia* ene de ĉi tiu sekcio. Serĉu en Fejsbuko: *Archivo Esperantista Andaluz.*

# F L A M E N K O
## *La Cigana Princo*

La malbenata koron-viruso jam forprenis dudek milon da homoj en Hispanio, unu el ili estis Enrique Castellón Vargas, konata en la flamenka kaj ĝenerale en la spektakla mondo kiel *"La Cigana Princo"*. Enrique Castellón naskiĝis en Valencio en la jaro 1932, verdire ne ĉiuj bonaj flamenkaj kantistoj nepre devas naskiĝi en Andaluzio ! Lia familio okupis sin je la brutar-vendado kaj la rond-iranta vendado. Inter lia granda familio troviĝis aliaj imponaj artistoj kiel *Dolores Vargas la Terremoto* (flamenka dancistino) kaj *Sabicas* (gitaristo), ili ambaŭ estis gekuzoj de Enrique Castellón.



Enrique Castellón Vargas *"La Cigana Princo"* ĉiam eleganta

Nur 14-jaraĝa, li debutis en madrida teatro ene de flamenka spektaklo kune kun *Lola Flores*, tiam la plej fama hispana kantistino. Kelkajn jarojn poste li jam estris sian propran flamenkan kompanion *"Pinceladas"*, li vojaĝis tra ĉiuj hispanaj vilaĝoj por prezenti sian flamenkan kaj hispan-koplan spektaklon. Ene de tiu kompanio debutis grandaj hispanaj kantistoj, ne vere flamenkaj sed koplaj, kiel *Rocío Jurado*, *Carmen Sevilla* kaj *Manolo Escobar.*

Li estis la aŭtoro de famegaj kantaĵoj, ofte kantitaj de aliaj, kiel "*Poromponpero*" de Manolo Escobar, "*Tengo miedo*" de Rocío Jurado aŭ "*Obí, obá*" de la flamenka franca ensemblo *Gipsy Kings*, ĉi tiuj mondfamaj kantaĵoj reale estis verkitaj de la Cigana Princo. Sed reale, lia plej fama kantaĵo estis la flamenka versio de *"In the Ghetto"* de la rokenrola reĝo *Elvis Presley,* kantita en la angla lingvo de la Cigana Princo, kun tre karakteriza angla-lingva prononcado.


Rilate la krom-nomon "la cigana princo", li mem asertis, ke dum sia infan-aĝo li estis blonda kaj verd-okula, vestita en tipa marista uniformo li aspektis kiel princo. Ĉu vere aŭ ne, li ĉiam prezentis sin tre eleganta sur la scenejo. Pace ripozu la Cigana Princo, kiu mortis la pasintan 22-an de aprilo.

<u>*Obí, obá,* mi ĉiutage vin amas pli</u>

*Obí, obá,* mi ĉiutage vin amas pli.
*Obí, obá,* mi ĉiutage vin amas pli.

Ciganino korb-faranta
vi estas mia trezoro, vi mia trezoro,
Se vi min ne priatentas
mi mortos pro l'doloro, pro l'doloro
Mi daŭre amos vin
mia ciganino, ciganino mia
malgraŭ ke vi min ne amas
dum via vivo neniam, dum via vivo neniam.

Vi jam havas mian koron
mia cigano, cigano mia
mi estos via la tutan vivon
kiel vi estas mia, vi estas mia.




# ANDALUZIA KUIRARTO

## *"Ajohuevo de Belalcázar"*

En la gastronomio de ĉiuj andaluziaj provincoj aperas recepto kiun oni povus aligi al la kategorio de receptoj *"jartapobres"*, jes ja, temas pri specife andaluzia vorto, kies signifo estus... *"tiu manĝaĵo preparita per malmultekostaj ingredientoj, kies celo estas malsatigi tiujn kiuj ne disponas pri multe da mono"*. La origino de tiaj manĝaĵoj troviĝas en tiuj antikvaj jaroj kiam vilaĝanoj nur povis uzi malmultekostajn ingredientojn por elabori receptojn.

La bazo de ĉi tiuj manĝaĵoj estas sama: pasto farita el pano aŭ el faruno, kiu poste estas fritita. Kompreneble, kiam la tempo pasis kaj la mono pli abundis, la ingredientoj pliiĝis kaj eĉ aperis aliaj pli multekostaj ingredientoj, kiel ŝinko. Do, ekzistas la *"sopaipa"* en Sevilo kaj en Kordovo, la *"paparajota"* en Jaeno kaj la *"ajohuevo"* en la vilaĝo Belalcázar, pri kiu ni parolos hodiaŭ. Do, preparu paton, ni hodiaŭ preparos bongustan *"ajohuevo"*.



Jen la ingredientoj:

- Raspita pano.
- Ovo.
- Petroselo.
- Ajleroj.
- Salo.
- Oliv-oleo.
- Ŝinko.

Jen la preparado:

1. Verŝu la raspitan panon en teleron. Aldonu batitan ovon, petroselon, la tranĉitajn ajlerojn kaj fine pecetojn da ŝinko.

2. Miksu ĉion per forko, fine la tutaĵo devas formi paston.


3. Prenu per viaj manoj iomete da tiu pasto kaj modlu ĝin, uzu viajn manojn. La formo de ĉiu peco povas aspekti kiel prem-platigita rondaĵo.

4. Preparu tiom da rondaĵoj ĝis kiam la pasto elĉerpiĝos.


5. Verŝu oliv-oleon, abunde, sur poton super fajro aŭ en la elektra kuirilo.

6. Metu la rondaĵojn el pasto en la oleon. Kiam la pasto estos fritita metu ili sur teleron. Por demeti la ne-necesan oleon de ĉiu rondaĵo vi povas uzi paperon sur la telero, ĝi altiros kelke da oleo.


**Ĉi-recepta vortaro:**



Pato




Ovoj




Raspita pano




Oliv-oleo




Ajlo / Ajlero



Salo



Petroselo



Ŝinko




Telero

# Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

## *La infano de la Jaena Katedralo*

Sendube Jaena urbo, kaj ankaŭ provinco, estas la plej mistera regiono en Andaluzio kaj eble eĉ en la tuta Hispanio. Jaeno estas plena je legendoj, do, estas eble aŭskulti rakontojn pri granda lacerto, pri antikvaj tabuloj kaŝitaj sub montoj, pri religiaj relikvoj ĉies adoritaj, ktp. Ĉi tiuj legendoj ne apartenas nur al pasintaj jarcentoj, ankaŭ lastatempe okazis paranormalaj fenomenoj, tute ne klarigeblaj per niaj objektivaj scioj. Unu el tiuj rakontoj, pri kiu ni parolos ĉi-numere, estas tiu historio pri la infano de la Jaena Katedralo.




Figuro de Jesuo Nazaretano en la Jaena Katedralo

Dum la Sankta Semajno (*Paskaj Festoj*), okazas en Jaeno procesio honore al tre laŭdita religia figuro, popole konita kiel "*La Avo*", temas pri la figuro de Jesuo Nazaretano portanta grandan krucon, survoje al Golgoto. Ĉiujare, je la 3-a horo de la Paska Vendredo ĝis ties tagmezo la figuro, akompanita de milo da kunfratoj, procesias tra la jaenaj stratoj. La figuro mem estas mistero, oni diras, ke ĝi estis ĉizata de mistera homo, konata kiel *la avo*, pro tio la nomo de la figuro mem. Aliaj asertas, ke la figuro mirakle savis la urbon de epidemio en la 17-a jarcento, laŭdire post la procesio de la figuro en la hospitalo ĉiuj

malsanuloj mirakle saniĝis kaj la urbaj aŭtoritatuloj eĉ devis fermi la malsanulejon, cele memori tion de la mano de la religia figuro pendas ŝlosilo.

Nu, oni rakontas jenan historion kiel legendon, tamen ĝi estas tute certa, ĉar ĝi okazis ne antaŭ multe da tempo, ĝuste en la jaro 1948. Tiam, dum la Paska Vendredo la procesio honore al Jesuo Nazaretano pasis apud la Jaena Katedralo, multaj homoj troviĝis en la placo. Infano, kiu rigardis la religian marŝadon el supra platformo, glitis kaj falis sur la plankon, li tuj mortis. Laŭdire, li vestis blankajn vestaĵojn, ŝajne li uzis blankan pantalonon kaj ĉemizon, similaj al tiuj uzataj de infanoj okaze de la unua komunia festo. Tio ne estas stranga, ĉar dum tiuj jaroj la unua komunia vestaĵo estis la plej luksaj de ĉiuj infanoj kaj sendube la paska vendredo estis taŭga okazo por vesti ilin.




Kolonoj ĉe la enirejo de la Jaena Katedralo, tien la infano grimpis.

Tiu rakonto estas tute certa, kompreneble nun aperis legendo pri kiu, kompreneble, oni povas opinii. Kelkaj jaroj post tiu malfeliĉa okazintaĵo, kelkaj homoj asertis, ke estis eble aŭdi la ploradon de infano je la horo kiam la katedralo fermiĝas. Aliaj eĉ asertas, ke estas eble vidi, efemere, apud la ĥoro de la katedralo la silueton de infano vestita per blanka pantalono kaj ĉemizo. Ĉi tion deklaris sakristiano de la preĝejo kaj purigisto, kiu eĉ telefonis la policejon por informi pri tio.

Informoj pri la posta polica priesplorado aperis sur la loka ĵurnalo kaj okazis tiam, ke multaj homoj sciigis, ke ili jam travivis similajn spertojn en tiu loko, tamen ili diris nenion ĝis tiam, ĉar ĉiuj pensis, ke temis pri eraraj perceptaĵoj. Laŭdire, eĉ la episkopo mem


vidis iufoje tiun strangan figuron. La urbestro de la urbo asertis ankaŭ, ke kelkaj oficistoj en la urbodomo vidis tiun infanon de tempo al tempo ĉe kelkaj salonoj de la municipa konstruaĵo. Oni devas diri, ke la jaena urbodomo troviĝas tre proksime al la katedralo, ĉe tiu sama placo kie la infano mortis. Laŭ la polica informo nenion strangan oni trovis ene de la katedralo, tamen tutcerte, ĉi tiu historio estas kroma paĝo en la legendaro de la plej mistera urbo en Andaluzio.



Ni ricevis en la redaktejo kelkajn inform-petojn kun la demando, ĉu aperos sur-papere tiuj numeroj aperantaj unue en interreto, tio estas la 114-a kaj ĉi tiu 115-a. Nu, ni profitas jenajn liniojn por sciigi, ke la revuo daŭre aperos sur-papere, kiel kutime de antaŭ 36 jaroj. Ĉi tiuj numeroj aperas unue en interreto, pro la kvaranteno dekretita de la hispana registaro, tio malebligas al ni presi la revuon en nia kutima presejo. Tamen, kiam ĉi tiu san-izoligo finiĝos, kaj espereble tio okazos kiel eble plej baldaŭ, ni sendos ĉi tiujn numerojn (114-a kaj 115-a) al niaj abonantoj kaj amikoj.
Tamen, ni profitas ankaŭ ĉi okazon por informi al niaj geamikoj, ĉu iu deziras ricevi la revuon nur per elektronika formato, ne sur-papere, tio ankaŭ povas okazi. Cele al tio estos necese kontakti kun la redaktejo de la revuo ĉe: cordoba@esperanto.ac

Hemos recibido en la redacción algunos correos electrónicos en los que se nos pregunta si se van a editar en papel los números 114 y siguientes, que está apareciendo en primer lugar en internet. Así que aprovechamos para informar que la revista seguirá editándose en adelante como se ha venido haciendo desde hace 36 años, es decir en papel. Estos números aparecen en primer lugar en internet, debido a la situación de confinamiento decretada por el gobierno español y que nos impide imprimir la revista en nuestra imprenta habitual. En cuanto esta situación finalice, y esperamos que sea lo antes posible, procederemos a enviar los números no editados en papel a nuestros suscriptores y amigos.
Pero aún así, aprovechamos también para informar a todos nuestros amigos, que si alguien desea recibir la revista sólo en formato digital, y no en papel, podemos hacérsela llegar exclusivamente de esa manera. Para eso, habrá que ponerse en contacto con la redacción de la revista en: cordoba@esperanto.ac

# Krucvortenigmo




## HORIZONTALE


1. Fotoaparato, kapabla registri sinsekvajn bildojn.
2. Nombro. ☐ Sen la lasta vokalo, kulturata kampo.
3. Inverse, konjunkcio esprimanta diferencon. ☐ Artikolo.

4. Kemia simbolo de Fosforo. ☐ La unua ☐ Foje litero, foje cifero. ☐ Simbolo de tuno.
5. Ekinodermo en formo de 5-pinta stelo.
6. Maljeso. ☐ Sen la lasta vokalo, ago de iu kiu iras per movoj pli rapidaj ol en marŝo.
7. Kavaĵo de la meza orelo, fermita de membrano.
8. Inverse, malagrabla impreso. ☐ Inverse, malne.

**VERTIKALE**

A. Tiu, kiu intence aŭ konscie plenumas ion riproĉindan aŭ punindan.
B. Membro. ☐ Inverse, morfemo signifanta "de ĉiu, de ĉiuj".
C. Inverse, esti en facilanima kaj bonhumora stato. ☐Ĉina mezurunuo.
Ĉ. Inverse, sufikso sen difinita senco. ☐ Adjektive, plej malgranda, supozita nedividebla, ero de la materio.
D. Finaĵo de adverbo. ☐ Simbolo de Oriento. ☐ Mallongigo de patro.
E. Inverse, sufikso esprimanta kolekton de samspecaj objektoj. ☐ inverse, osto de mamuloj kaj birdoj.
F. Sen la lasta vokalo, granda rabobirdo. ☐ Inverse, malplezuri pro senintereso aŭ neokupiteco.
G. Plurale, homo, kiu kutimas fari publikajn paroladojn.


- **Solvo al la pasintnumera Nuda Krucvortenigmo.**



| | A | B | C | Ĉ | D | E | F | G |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 | V | I | R | E | S | T | U | H |
| 2 | O | J | U | T | P | I | G | E |
| 3 | S | A | ■ | I | R | ■ | N | J |
| 4 | U | G | I | K | I | Z | U | M |
| 5 | R | ■ | M | O | T | O | ■ | E |
| 6 | I | L | ■ | N | A | ■ | O | P |
| 7 | V | I | A | ■ | ■ | M | U | R |
| 8 | N | O | R | O | K | A | L | O |

Frazo kaŝita: VI RESTU HEJME PRO LA KORONVIRUSO

# Rebuso




- En kiu ajn grupo tio estas necesa, se oni deziras sukcesi:

---

- **Solvo al la pasintnumera Rebuso.**

*Frukto kiu timigas nin fine de oktobro:*

***KUKURBO***

Sur la bildo aperis unue KUKO (Kuk'), poste URBO.

Do, la solvo estis KUKURBO. Dum la halovena festo, fine de oktobro, kukurbo maskita estas uzata por timigi nin.

# HUMURO




Ĉu la revuo plaĉas al Vi? Ĉu Vi ŝanĝus ion?
Ĉu io aldonebla? Ĉu forviŝi ion?
Komentu kaj proponu per jena kontaktilo:

cordoba@esperanto.ac

aeu
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto

# Direcciones útiles del movimiento esperantista en Andalucía:

- ✓ En Málaga: angelarquillos@gmail.com
- ✓ En Sevilla: info@esperantosevilla.org
- ✓ En Córdoba: cordoba@esperanto.ac
- ✓ En Granada: granada@esperanto.ac
- ✓ En Ronda: arunda@esperanto.ac
- ✓ En la Axarquía malagueña: surlamar@hotmail.com




**<u>Nia celo:</u>** kunlabori en la fondiĝo kaj disvolvo de esperanto-grupoj en la tuta Andaluzio. Helpu nin !

**Andaluzia Esperanto-Unuiĝo**
**Asociación Andaluza de Esperanto**

★

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.
Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

Estraro

Prezidanto : Angel Arquillos López
Vicprezidantino: Fátima Jiménez García
Sekretario: José María Rodríguez Hernández
Kasistino: María Dolores Torres Mateo
Voĉdonantoj: Jordi Lietor López
Carlos Spinola
Juan García del Río
Alejandro Burgos Escalante
Juan Díaz Casado

Adreso: C/ Ánfora 6 5-D 29013 Málaga

E-Adresoj: angelarquillos@gmail.com
cordoba@esperanto.ac

TTT-paĝo: www.esperanto.ac
www.esperanto-andalucia.info
Blogo: www.andaluciaesperanto.blogspot.com

Aliaj utilaj adresoj de la Esperanto-Movado

* Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)
uea@inter.nl.net

* Hispana Esperanto-Federacio
C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)
admin@esperanto-es.net




*Dum ĉi tiuj tagoj restu*
*hejme kaj ĝuu grandan*
*kolekton da verdaj filmetoj*
*en esperanto !!!*

*Vizitu: https: tubaro.aperu.net*